


# ELNA NEWSLETTER

## NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM AND ESPERANTO AS A SOLUTION

Bimonthly organ of the Esperanto League for North America, Inc., Box 1129, El Cerrito, CA 94530, U.S.A.  
Telephone: [415] 653-0998. Editor: William R. Harmon. Includes promotional section in English and  
informational section in Esperanto for ELNA members. ISSN 0030-5065. Vol. 14, No. 4. July-Aug. 1978



**EVERYBODY** reads *HEROLDO* in San Francisco! Students in the summer Esperanto classes at San Francisco State University were guests at garden parties held in the homes of Bill and Lucy Harmon and Bill and Cathy Schulze.



There were serious moments, too. Professors Probal Dasgupta and David Jordan collaborate on lesson preparation (right photo). At the left, the class reacts to a Jordan witticism.

## FIRST JOINT CANADIAN-AMERICAN ESPERANTO CONGRESS A SUCCESS

As reported in previous issues of *Newsletter*, the 26th Annual Congress of Esperanto in the United States held by the Esperanto League for North America, Inc., and the 20th Annual Congress of Esperanto in Canada held by the Canadian Esperanto Association were combined and held at the University of Wisconsin-Milwaukee this year from July 22 to 25.

Presidents Wally du Temple of the Canadian organization and Wm. R. Harmon of the American organization jointly opened the first official session with brief addresses to the combined group. The groups convened separately upon several occasions during the joint congress and also held several common sessions.

President du Temple's address emphasized the value of the neighboring countries' organizations being able to exchange views and together find ways for the organizations to help each other. Mr. du Temple pointed out that Canada has a particularly severe language problem stemming from the separatist movement in Quebec, and that quite apart from the political ramifications in Canada, the existence of the problem has given Canadians a real awareness of the role of national languages as political tools, and of the need for a neutral common tongue to permit communication between peoples of different language groups without involving ideology.

President Harmon expressed full agreement with the concept of mutual assistance between the two groups. Discussions centered on a candid analysis of the reasons for lack of adequate progress in furthering the use of the international language. Du Temple pointed out that every Esperantist must critically survey his own knowledge of the language, his activity in local groups or classes, and his contribution to the national effort. He pointed out several indications in Canada of reawakening and renewed interest in Esperanto, particularly the breakthrough in obtaining governmental acceptance and support of a correspondence course in British Columbia.

The joint Congress was attended by approximately 100 delegates from many different states. Visitors from abroad included Mrs. Proctor of England, Mr. Hall of New Zealand, Mr. Banas of Poland, Mrs. Dercks-Iansen and her daughter of Holland and Mr. R. Alberg of Israel.

### CHANCELLOR WELCOMES ESPERANTISTS

Chancellor Werner Baum of the University of Wisconsin-Milwaukee addressed the joint congress during the formal opening ceremonies, regaling the audience with a few horror stories of past interpretation problems and errors during international conclaves he has attended.

### ESPERANTO COURSE AT UNIVERSITY OF ILLINOIS

During the spring session of the University of Illinois (Urbana, IL) a course will be offered in the Department of Linguistics on "International Communication and Constructed Languages." The course will be taught by Prof. C. C. Cheng of the Department of Linguistics and the Center for Asian Studies, well known for his linguistic studies of Chinese, and by Prof. Bruce Sherwood of the Department of Physics and the Computer-based Education Research Laboratory, who is known for work on the development of the PLATO computer-based education system and for multi-lingual speech synthesis (including Esperanto). The course will deal with the language problem and with interlanguages, both national and constructed, with particular emphasis on Esperanto. It is designed to provide fresh insights into problems of language planning. This will be the first time that such a linguistics course has been offered at the University of Illinois.

Bruce Sherwood

### "OOPS!" DEPARTMENT [Foreign Div.]

From *New York Magazine*: "President Carter isn't the only one having his troubles with translators. Recently, a UN delegate made a speech in which he used the phrase "out of sight, out of mind." A Russian translator, unfamiliar with the expression, rendered it this way: "Blind, and therefore insane."

### "NO, VIRGINIA..." Dept.

From *Agence France-Press*: ISLAMABAD, Pakistan -- Pakistan is to drop English for official speeches in honor of foreign guests and switch to Urdu instead, it was announced recently. English would not be used even for heads of state.

From *The University Woman*, May, 1978, reporting on a recent convention of the International Federation of University Women: "The most appalling activity of the whole conference was the apparent unwillingness to make it possible for those struggling with a language barrier or limited knowledge of international rules of order to participate. A request and an offer by a Spanish-speaking delegate to interpret the discussions in Spanish was turned down abruptly, causing the Mexican delegates to walk out."

### ELNA TRAVEL COMMITTEE REPORT ON VARNA UK

Back from Bulgaria, Russia and Europe. What a trip! Varna was all that was promised and a lot more that was not promised. We made some wonderful new Bulgarian friends while striving to overcome our difficulties. The weather was not as warm as we had expected and that was very conducive to being alert for all the meetings and lectures. The best summary I heard of the Congress of Esperanto in Varna was that there were over 4,400 people there at the same time and it all somehow worked. For the first-time congress participants it was a thrilling experience - meeting people from all over the world and being able to converse with them. The first-timers participated and gained much from the various courses offered, including the Ceh method and progressive courses. As for my own (Janet Brugos-Young) participation in the Congress, it was somewhat limited as I spent many, many hours trying to unravel travel arrangements that I had not made. The highlight of our last evening in Varna was a starlight oceanside dinner. Almost all of the U.S. delegation was able to attend along with our new Bulgarian friends.

To save the great trouble experienced by some of those attending the Congress in Varna, we suggest that you make all of your travel arrangements through the ELNA Travel Committee so that there is one "one-the-spot" representative to handle any problems that may arise. The Local Congress Committee for the next Universal Congress, in Switzerland, has informed us that they will release hotel space to the Committee so that you may receive your hotel confirmation directly from the ELNA Travel Committee rather than from Europe.

Future plans of your ELNA Travel Committee: A spring trip to Europe to include a week's stay at Castle Gresillon in France; plans for the Universala Kongreso de Esperanto in Lucerne include trips with stops for the courses in Helsingor, in Finland, or at Castle Gresillon before the one week stay at Lucerne.

The official post-congress trip will be to Interlaken, from August 5 to 11, 1979. Following that there will be a one week trip within Switzerland (as proposed by the ELNA Travel Committee), or as an alternative to the Switzerland stay, a trip to Barcelona, Madrid and Lisbon. All trips proposed by the ELNA Travel Committee will welcome participants from other countries. A brochure detailing all plans of your committee will be distributed to ELNA members no later than October, 1978.

You can contact your ELNA Travel Committee by telephoning Janet Brugos-Young or Lucille Harmon at (415) 459-1313, or by writing to the Committee c/o Horizons Unlimited Travel Service, 928-A Sir Francis Drake Blvd., Kentfield, CA 94904.

### AN APOLOGY TO OUR READERS...NI PETAS PARDONON!

Due to both normal and abnormal "summer crises" this issue of your *Newsletter* is much delayed. We are slowly working out the remaining difficulties in administration, and the one thing we have in good stock, enthusiasm, will soon bring everything back to an on-time, stable basis.

Probably the best news of all is that Mrs. Catherine Schulze has consented to take on the onerous task of editing the *Newsletter* starting with the next issue. This will free President Harmon to tackle other matters needing attention, and bring to the *Newsletter* an editor with great skill and knowledge.

**OFICIALA PROTOKOLO DE AGOJ KAJ DECIDOJ DE LA 26a  
ELNA KONGRESO EN MILWAUKEE, 22-25 JULIO 1978**

**RICEVIS** salutparolon de S-ro Wally du Temple, prezidanto de Kanada Esperanto-Asocio, raportante agadojn dum la pasinta jaro en Kanado, inkluzive la oficialigon de Esperanto-kurso per korespondo kun registara subtenado, kaj la preparon de vidbendo por duonhora televida programo pri Esperanto.

**AKCEPTIS** proponon de prezidantoj du Temple kaj Harmon ke la du organizoj, KEA kaj ELNA, daŭre kunlaboru pri reciproka informado kaj helpado.

**AKCEPTIS** saluton de D-ro Werner Baum, kanceliero de la Universitato de Wisconsin, Milwaukee.

**AKCEPTIS** salutleterojn kaj telegramojn de:

William Proxmire, Senatano el Wisconsin  
Gaylord Nelson, Senatano el Wisconsin  
Martin J. Schreiber, Guberniestro de Wisconsin  
Henry S. Reuss, Reprezentanto en Kongreso el Wisconsin  
Henry W. Maier, Urbestro de Milwaukee.

**OMAĜIS** forpasintajn amikojn Mario Pei kaj S-ino B.J. Balcar.

**RICEVIS** salutojn de eksterlandaj Esperantistoj Cissy Proctor (Britujo), S-ino Dercks-Iansen kaj F-ino Dercks (Nederlando), S-ro Norris Hall (Nov-Zelando), Zbigniew Banas (Polujo), Mikulas Nevan (Nederlando) kaj R. Alberg (Israelo).

**DUMKONGRESAJ KOMITATANOJ** nomitaj de prez. Harmon:

Rezolucia Kom.: Armin Doneis, John Lewine.  
Balota Kom.: Dorothy Jones, Ken Thomson, Dale Brown.  
Financa Kom.: Dorothy Jones, Robt. Swenson, Wm. Harmon.

**AKCEPTIS** kun aprobo la sekvantajn raportojn de daŭraj komitatoj:(vidu tekstojn en alia loko)

Usona Ekzamena Servo - Dorothy Holland  
ELNA Koresponda Kurso - Dorothy Holland  
Kandidatiga Komitato - F. Helmuth  
UN-Agado - Mark Starr  
UEA-Peranteco de ELNA - Wm. Harmon  
Scienca k Teknika Kom. - Kent Jones  
ELNA Vojaĝa Servo - Janet Brugos-Young  
Centra Oficejo - Jonathan Cole  
ELNA Arĥivo - D-ro B.J. Balcar  
Financa Komitato - C. Schulze por Wm.Schulze, Estro

**RICEVIS** raporton de D-ro Pierre Ullman, ke la Esperanto Studies Foundation ĵus leĝe enkorpiĝis, kaj estos sekcio de Modern Languages Association.

**RICEVIS** raporton de la dumkongresa balota komitato, jene:

Prezidanto: Wm. R. Harmon reelektita  
Vicprezidanto: Ken Thomson elektita  
Estraranoj: Elektigis Robert Swenson, Thomas Goodman, Mary Hammersmith.

**RICEVIS** raporton de prez. Harmon, ke mankas sufiĉaj estraranoj ĉe la kongreso por havi kvorumon, do post diskuto inter la ĉeestantaj estraranoj, kelkaj proponoj venos rekte al la kongreso por diskuto kaj decido, kiel rezolucioj.

**APROBIS** proponon, ke ELNA ne entreprenu la diskutitan eblecon reeldoni la diskon *Ni Kantu en Esperanto*, nun posedaĵo de S-ro Stollman, kaj malakceptis la proponon de S-ro Stollman.

**APROBIS** unuanime la jenajn rezoluciojn traktitaj dum la kongreso (origino de la rezolucio inter krampoj)

01. Ke la Kongreso esprimu kondolencojn al S-ino Pearl Pei pro la morto de D-ro Mario Pei, Honora Membro de ELNA. D-ro Lewine verkos kaj liveros al S-ino Pei. (Lewine)

02. Ke ELNA subtenu refoje la Elanglan Tradukan Konkurson juĝota ĉe la UK en Lucerno, ĝis maksimuma elspezo de \$150. (Harmon)

03. Ke ELNA starigu specialan kason por ebligi la represon de la broŝuro de Public Affairs Committee, verkita de D-ro Pei, *A Second Language for the World* en ĝisdatigita eldono. (Starr)

04. Ke ELNA organizu specialan faklaboron inter samfakanoj simile al AATE por edukistoj, por gajni agnoskon kaj subtenon de Esperanto el diversaj grupoj de spertuloj. (Starr)

05. Ke ELNA nomu Bonnie Helmuth esti la nova Ĉefdelegito de UEA por Usono, efektivaĵo kiel eble plej baldaŭ; kaj ke la Kasisto de ELNA estu rajtigita repagi ĝis \$100 por elspezoj al S-ino Helmuth por ke ŝi povu vojaĝi al la Centra Oficejo por transpreni ĉiujn materialojn pri la UEA-peranteco. (Harmon)

06. Ke ELNA nomu S-ron Armin Doneis Honora Membro de ELNA, rekonante la longan laboradon kaj multajn servojn de S-ro Doneis al Esperanto, inkl. longan servon kiel Ĉefdelegito de UEA por Usono. (Harmon)

07. Ke ELNA plifortigu kontaktojn kun UN, laŭ la programo de UEA, kaj kun UNA kiel membro de la Konsilantaro de Organizo en tiu organizo, per resti membro de UNA ĝis kontraŭa voĉdono de ELNA Kongreso. (Starr)

08. Ke ELNA instigu al siaj membroj aktive kunlabori en aliaj organizoj kaj movadoj kies celo estas plibonigi la vivon, la dignon kaj la humanan spiriton inter homoj; kaj en la kadro de tiaj movadoj uzi kaj diskonigi la lingvon internacian Esperanto. (Nell)

09. Ke ELNA formale esprimu, pere de la prezidanto, al Kanceliero Baum kaj S-ro Busch la dankemon de la Ligo por la helpo kaj kunlaboremo kiun ni spertis en Milwaukee. (Harmon)

**POST AKCEPTO** de la refoja elekto al la prezidanteco, S-ro Harmon nomis la sekvantajn komitatojn kaj komisiitojn por la sekvanta jaro:

**Financa Komitato:** Wm. Schulze (Estro), Dorothy C. Jones, Wm. Harmon.

**Kandidatiga Komitato:** Catherine Schulze (Estro), Peggy Schneider, Maria Murphy, Lee Edwards, Ken Ver Ploeg.

**Supervida Komitato pri Instruaj Aferoj:** J. Lewine, Kuniganto.

**Universitata Sekcio:** J. Pool, B. Sherwood, J. Lieberman.

**Gimnazia Sekcio:** D. Holland, Gigi Edwards, aliaj nomotaj.

**Vojaĝa Komitato:** Lucille Harmon, Janet Brugos-Young.

**Biblioteka Fonduso:** J. Pool, J. Lieberman, Direktoro de CO.

**UN Aferoj:** M. Starr, J. Tonkin, M. Lorie, P. Dasgupta, M. Massen.

**CO Administrado:** Wm. Harmon, D. Jones, Direktoro de CO.

**Science k Teknika Komitato:** K. Jones (Estro), aliaj nomotaj de Jones kaj raportotaj al la prezidanto.

**Komisiito por UNA:** John Lewine

**Komisiito por Aŭdvida Fako:** Ken Ver Ploeg

**RAPORTO DE LA CENTRA OFICEJO DE ELNA - 1978**

Mi ne povas doni plenan raporton pri la agado de la Centra Oficejo, ĉar mi nur eklaboris tie antaŭ du monatoj. Mi do nur donos tre mallongan statistikan resumon pri la agado de la Oficejo dum la pasintaj du monatoj.

Miaj ĉefaj devoj en la oficejo apartiĝas en tri bazajn kategoriojn: respondado al informpetoj, plenumado de libromendoj, kaj traktado de membrecoj.

En la lastaj du monatoj mi ricevis 50 ĝeneralajn informpetojn, rondcifere. El tiuj, proks. 30% venis el Kalifornio, 30% el la orienta marbordo de Usono, 20% el la sudo, kaj 15% el okcidenta Usono escepte Kalifornio. Kvar informpetoj venis el eksterlando; po unu el Nigero kaj Japanio, kaj du el Irano. Ses el la informpetoj estis profesoroj ĉe universitatoj aŭ kolegioj.

En la pasintaj du monatoj ni traktis proks. 70 membrecaĵojn. El tiuj proksimume 50 estis realiĝoj instigitaj de la realiĝkampanjo de Marta Evans. Ni ankaŭ plenumis pli ol 120 libromendojn. La enspezoj de tiuj vendoj estis traktitaj en la financa raporto.

La plej urge bezonata afero nun estas la nova librokatalogo. Unu el miaj ĉefaj problemoj estas la ĉiam pli alta kosto sendi librojn per poŝto. En la lastaj du monatoj, la poŝta servo anoncis du sinsekvajn altigojn de la tarifo, kiu en la lastaj du jaroj altiĝis je pli ol 133%. Estas antaŭvideble, ke ni devos baldaŭ revizii nian propran politikon por sendokostoj.

Mi preferis fini la raporton per pli agrabla sciigo, do mi estas feliĉa raporti, ke la Libroservo de la ELNA Kongreso ricevis pli ol \$850. Ni dankas ĉiun aĉetinton.

Jonathan A. Cole

**BELAJ SENKOSTAJ BROŜUROJ HAVEBLAJ**

Belaj broŝuroj kun teksto en Esperanto estas haveblaj de: *Esperanto-Huis*, Riouwstraat 172, 2585 HW Hague, Nederlando.

**NE NUR POR INSTRUISTOJ...SED POR ĈIUJ!**

La kvaronjara *Bulteno* de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto (AATE) redaktata de Dorothy Holland, daŭre prezentas interesan kaj valoran novaĵojn kaj sugestojn. Ĉi tiu mimeografita bulteno ofte enhavas pli ol 18 paĝojn, plenplenaj je interesaj eroj, ne nur pri instruado.

Ni forte rekomendas aniĝon en AATE, kiu inkluzivas abonon al la *Bulteno*. Petu aliĝilon de: S-ino Mary Meyers, 253 E. Delaware Place, Apt. 21-B, Chicago, IL 60611. La kosto estas minimuma: nur \$5 jare.

## RAPORTO DE A.A.T.E. POR 1978

Nombro da membroj de AATE je julio, 1977	92
Nombro da membroj de AATE je julio, 1978	101
Pligrandiĝo de la anaro dum pasinta jaro	9
Anara procento da profesiaj instruistoj	68%
Nombro da neprofesioj	33%
Nombro da kursanoj raportitaj al la eduka sekretario	320
Kaso de AATE: Saldo en 1977	\$415.93
Kaso de AATE: Saldo en 1978	\$641.84

AATE ricevis inviton oficialan de Northeastern Conference partopreni la Jarkunvenon de tiu konferenco. La inviton ebligis la subteno financa de Esperantic Studies Foundation pro la klopodoj de D-ro E. James Lieberman, Prezidinto de ELNA, en Vaŝingtono.

Delegitoj al la konferenco estis Thomas Goodman, Vicprezidanto de AATE kaj John L. Lewine, Prezidanto de AATE.

Troviĝis en la Ekspoziciejo de Hilton Hotel en Novjorko Esperanto-budo kie troviĝis bela ekspozicio de Esperantaĵoj kiujn preparis kaj el Baltimore transportis S-ro Goodman. Duono de la ekspozicio prezentis ekzemplerojn de verkoj originalaj kaj tradukitaj en la lingvon internacian, inter kiuj troviĝis literaturaj, historioj de la lingvo Esperanto, lernolibroj kaj sciencaj verkoj, verkoj por ĝeinfanoj ktp. La alia duono prezentis ekzemplerojn de Esperanto-teksto kiun verkis S-ano Goodman por la kursoj kiujn li gvidis en la nomo de la Departamento de Publika Edukado de la Ŝtato Maryland, sur kiuj troviĝis la ŝildo oficiala de la Ŝtato, indikante ke ili estis eldonaj oficialaj de la Ŝtato. Tiujn ekzemplerojn oni disdonis al la partoprenantoj de la kunveno senkoste. Ankaŭ okazis du prelegoj publikaj de S-ro Goodman pri Esperanto kiel ilo propedeŭtika en la instruado de lingvoj eksterlandaj. Alestis pli-malpli 2,800 instruistoj de Usono, Kanado kaj el landoj ekster Norda Ameriko. Al la fino de la kunveno oni elektis la du delegitojn de AATE al la Konsulta Konsilantaro de Northeast Conference por helpi je la preparado de la kunveno en 1979 en Vaŝingtono kun la temo "Fremdaj Lingvoj en la Klasĉambro."

John L. Lewine  
Prez., AATE

## RECENZO

*Malmalice*, Johán Valano, eld. La Nuova Frontiera, Pisa, 1977. 59p. Broŝurita. \$5.00 de ELNA Libroservo.

Antaŭ du jaroj aperis la detektiv-romano *Ĉu Vi Kuiras Ĉine?*, baldaŭ premiita kiel la plej bona libro de la jaro. La pseŭdonima aŭtoro de tiu libro, Johán Valano, nun regas nian literaturon per pruvo de sia talento sur la kampo poezie.

La poemoj en tiu ĉi libro, pli-malpli kronologie aranĝitaj, prezentas la poezian kaj emocian evoluon de la aŭtoro. Li ekverkis kiam li estis adoleska, en la finaj jaroj de la Dua Mondmilito. La sensencaj hororoj de tiu epoko taŭzis lian senteman psikon, kaj en la unuaj poemoj ni trovas elokventan esprimon de la indigniĝo kaj naŭziĝo de pacema junulo pro la bestaĵoj de milito. Tamen, el tiu periodo ni trovas ankaŭ kelkajn poemojn pli petolajn, eĉ spritajn.

Postaj poemoj montras la pliaĝiĝon de la poeto; versoj pri studenta vivo, vojaĝado, kaj amo. La lasta duono de la libro prezentas verkojn de la poeto jam matura. Inter ili troviĝas poemoj profundaj, kun temoj universale vastaj. Pluraj el tiuj ĉi, ekzemple "Senpoveco" kaj "Solena saluto", rangiĝas kun la plej bonaj originalaj poemoj en Esperanto.

Valano estas lerta versisto, kaj tiu ĉi kolekto atestas lian mastradon de formoj tre diversaj. Li ofte utiligas la metodon (neofan en esperanta poezio pro ĝia kondamnigo en *Parnasa Gvidlibro*) de aborta rimo, t.e. la rimigo de radikoj sendepende de la finaĵoj (ekzemple suno-junas). Kiel Henri Vatré atentigas en la enkonduko, Valano eĉ plisistemigas la rimojn, rimante la radikojn laŭ unu skemo kaj la finaĵojn laŭ alia. En aliaj poemoj li uzas blankajn versojn, kiujn kelkaj recenzistoj jam komparis al tiuj de Walt Whitman.

Ĝisnunaj indikoj aŭguras, ke ni rajtas atendi de la "duopo" Johán Valano/Claude Piron pliriĉiĝon de nia lingvo en preskaŭ ĉiuj ĝiaj facetoj.

...recenzis Andro

## FINANCA RAPORTO DE KASISTO - FISKA 1977-1978

## ENSPEZOJ:

Membrokotizoj	\$7103.00
5% de Dumviva Konto (6945.97)	365.58
Rento	1528.71
Donacoj por ĝenerala kaso	11761.47
Donaco, Biblioteka Fonduso	1026.00
Subvencia Fonduso	250.00
Profito ( <i>perdo</i> ) de Kongreso - 1977	-17.34
Profito ( <i>perdo</i> ) de Kongreso - 1978 (nekompleta)	106.00
Enspezo de UEA-peranteco el CO	1470.64
Kontrib. de Direktoro CO al Cal.SDI	88.12
Kontrib. de Direktoro CO al Cal.Imposto	121.30
Kontrib. de Direktoro al Fed.Imposto	1146.60
Vendoj, Calif.	4592.81
Vendoimposto kolektita	281.64
Vendoj, ekster Calif.	14821.44
Abonoj	346.52
Poŝtokostaj enspezoj	761.98
Kores.Kursa Enspezo	350.91
Ricevita por UEA	534.76
Reklamoj	55.25
<b>SUMO, ENSPEZOJ</b>	<b>\$46695.39</b>

## ELSPEZOJ:

UEA kotizoj por ELNA	\$135.00
Korporaciaj kostoj	65.00
Admin.Elspezoj - Prez.	181.95
Admin.Elspezoj - Kasisto	116.20
Admin.Elspezo - Speciala Komitato	29.66
Presigo, krom NL kaj CO	48.03
Stato de Delaware Imposto	10.00
UNA Membreco por ELNA 1978	100.00
Pagoj al Cal. SDI	90.50
Pagoj al Cal. Imposto	131.70
Pagoj al Fed. Imposto (por Direktoro CO)	1217.30
Lukosto, CO	2250.00
Vendoimpostoj al Calif.	255.35
Salajro, Direktoro CO	8811.73
Alia laboro ĉe CO	354.11
Calif. Unempl. Ins.	285.57
Telefono, CO	157.46
Elektriko, ktp CO	467.60
Asekuro, CO, Librostoko	1460.00
Transporto	493.77
Oficejaj provizoj	783.98
Presigo, Newsletter	1699.78
Presigo, Libroservo kaj CO	311.87
Poŝto	1800.31
Pago de abonoj	250.35
Pagita transe al UEA	472.50
Komercpermesiloj lokaj	100.00
Oficeja maŝinaro	100.13
Riparo de maŝinaro, CO	78.64
Bankokostoj	57.93
Libroj kaj materialoj aĉetitaj por vendo	10915.06
Koresponda Kurso pagoj	219.90
Aĉeto de materialoj por dissendado	1509.30
Reklamado	272.10
<b>SUMO, ELSPEZOJ</b>	<b>35232.78</b>
Diferenco, Enspezo	<b>\$11462.61</b>
<b>Kaso, je 1978.06.30:</b>	
En ĉekokonto Portland	\$1423.55
En ĉekokonto CO	522.00
En ŝparkaso Portland	4644.54
En ŝparcertigiloj [longdaŭraj], Portland	27533.13

[Nota: la kaso de ELNA plejparte estas investita en ŝparcertigiloj ("C.D.") je rento de 6.5% ĝis 7.5%, daŭroj de 1 jaro ĝis 6 jaroj.]

## RAPORTO DE LA KOMITATO POR SCIENCAJ KAJ TEKNIKAJ AFEROJ

Responde al la peto de Iranano D-ro M.H. Saheb-Zamani, en January 1978 ELNA-Prezidanto Wm. Harmon starigis ĉi tiun Komitaton. Ĝi celas, kunlabore kun similaj grupoj en aliaj landoj, krei altkvalitajn referenc-kaj lerno-librojn pri sciencaj kaj teknikaj ("S/T") temoj.

Ni uzis la unuajn monatojn en la kreado de nia provizora komitata strukturo, kaj en la priesploro de la ĝenerala laborkampo.

### Strukturo:

Subkomitato	Ĉefo
Tradukista	D-ro Ralph Lewin
Verkista	Ing. William Simpson
Vortarista	S-ro Peter Benson
Redaktoro	Mag. Wm. McElwain
Administranto	Ing. R.K. Jones

La baza klasifik-sistemo por nia laboro estos la Universala Decimala Klasifiko (UDK), kiu aperas en 19 lingvoj, kaj estas uzata en la Terminologia Centro (TC) de la Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) por la Slipara Vortaro. La 500-aj kaj 600-aj numeroj ĝenerale kovras la S/T teronon. Liston de ĉiuj titoloj kun tiuj numeroj afable faris la Bibliotekisto de la Brita Esperanto-Asocio, S-ino P. Maybin. Entute estis nur 669 (228 Sc., 441 Tekn.) en la tuta kolekto de pli ol 10,000 titoloj. Kvankam kelkaj estas bonaj, ĝenerale ili estas malnovaj kaj eksmodaj. Tio signifas ke la ĝisnuna S/T libraro helpas nin malmulte.

En la libro *Konturoj de la Lingvonormigo en la Tekniko de D-ro Eugen Wüster* estas informo pri Terminologia Komitato 37 de la ISO (v. p. 126) kaj ĝiaj 7 rekomendoj:

R 1087	Vortaro de Terminologio
R 919	Gvidilo por la pretigo de sistemaj vortaroj
R 860	Internacia unuecigo de nocioj kaj terminoj
R 704	Principoj de nomado
R 1149	Prezento de plurlingvaj sistemaj vortaroj
R 639	Simboloj por lingvoj, landoj kaj aŭtoritatoj
R 1951	Leksikografiaj simboloj

Ni petis kaj ricevis permeson de la ISO traduki kaj eldoni tiujn normojn. S-ro Conrad Fisher jam faris la komencan, malnetan tradukon de ĉiuj. Ili nun estas en la mano de la TC de ISAE (Rudiger Eichholz).

En Varna dum la UK mi renkontis kelkajn gravajn personojn en la S/T kampo, ekz.:

IEAE:

D-ro Kawamura, Prez.

D-ro Stöp-Bowitz, VP

D-ro Kavka, Gen. Sekr.

D-ro Yamazoe, Estrarano kaj Red. de M.I.R.

D-ro Peřvski, Estrarano

D-ro Velooren van Themaat, Estrarano

S-ro Lo Jacomo, Matematika Sekcio

Sciencaj Komunikajoj:

D-ro Hászpra - Redaktoro

Ing. Munnuch - Kunlaboranto

D-ro Molnár - Kunlaboranto.

La du konkludoj de miaj spertoj en Varna estas:

1. D-ro Stöp-Bowitz invitis ke mi kreu proponon por la internacia disdivido kaj reciproka interhelpo de ĉiuj S/T grupoj.

2. D-ro Hászpra invitis manuskriptojn (preferè bone ilustritajn) de ĉiuj partoprenantoj de KSTA. Ĉiu verku en sia fako.

Resume, KSTA estas provizore organizita kaj invitas volontulojn kun S/T lertecoj. Dum ni atendas la aprobon de la supre-menciita plano por internacia kunlaboro, ĉiu KSTA-ano estas petata ekzerci sin en la verkado de artikoloj por *Scienca Revuo kaj Sciencaj Komunikajoj*.

R.Kent Jones, Komitatatestro

## JARRAPORTO DE LA ELNA ARKIVISTO - 1978

Ĉijare nur 11 donacintoj kontribuis esperantaĵojn al nia arkivo: Centra Oficejo de ELNA, S.R. Docal, A.F. Doneis (2 pakajoj), G. Harabaĝiu, R.K. Jones, R. Lewin (1 plenskatolo), E.A. Lewis, R.Orloff-Stone, J. Pool, M. Starr, H. Tonkin. Senpage ni ricevadas jenajn periodaĵojn: *Bulteno de AAIE*, *ELNA Newsletter*, *Lumo* (Kanado). Aldone al tio ni ricevis kelkajn prov-numerojn: *Informilo pri Horizonto*, *La Socialisto* (Austrujo), *Monata Cirkulero de Kultura Centro Esperantista* (Svislando).

Laŭ *Newsletter de ELNA* ekzistas en Usono pli ol 20 Esperantistaj societoj, asocioj, kluboj kaj centroj. El ili, bedaŭrinde, nur tiuj ĉi kvar grupoj sendas al ni bultenojn; Esperanto Societo of Washington, D.C., Esperanto-Klubo de Los Angeles, SFERO, kaj Seattle Esperanto Society. Se aliaj Esperantistaj organizoj publikigas informilojn, bonvolu sendadi ilin ankaŭ al la arkivo por dokumentado la aktivecon de nia movado. Pro ĉiuj akiritaĵoj al ĉiuj donacintoj elkorajn dankojn!

Du serioj da eventoj konsiderinde influis mian poresperantan laboron. Unue, nia 6-semajna restado en Europo. Unua duono sur la kontinento, la dua en Britujo. Dum mia edzino ĝuadis kunestadon kun parencoj kaj geamikoj en Ĉeĥoslovakio, mi vojaĝis tra Esperantujo okcidente. En Dijon, Francujo, Del. H. Journet ne nur gavigis kaj regalis min, sed montris al mi urbajn vidindaĵojn kaj veturigis min 45 KM al Gray, kie Del. G. Junier kondukis nin tra Nacia Esperanto-Muzeo. La Esperanta sekcio en la biblioteko de Unuiĝintaj Nacioj en Genevo malsurprizigis min, ĉar ĝi estas malgranda kaj malaktuala. La bone organizitan libron de D-ro Edmond Privat montris al mi en La-Chaux-de-Fonds bibliotekisto Pierre Hirsch, kies paroladon pri Romain Roland kaj Privat mi ĉeestis vespere. La vigleco de Kultura Centro Esperantista (KCE) en la sama urbo estas vere admirinda. En Nŭrnberg (Bavario) mi vizitis mian ŝatatan korespondanton Alexander Starke. Li kaj lia edzino, nun pli ol okdekjaraj, estis famaj Esperantistaj geaktoroj. Dum la 18a Europa Ferio-Semajno en Svislando (EFS) en Wengen mi partoprenis selektitajn kursojn sur tri niveloj, ekskursojn, prelegojn, amuzajn vesperojn ktp. En Zurich mi intervjuis d-ron M. Tucek, administraton de la Svisaj Socialaj Arkivoj.

En Britujo mi vojaĝis kun mia edzino por soleni la 30an datrevenon de nia edziĝo. Unue, dum du semajnoj, autobuse tra Anglujo, Skotlando kaj Kimrujo. La lastan semajnon ni dediĉis al Londono. En Edinburgo interalie min interesis vizito al la Nacia Biblioteko de Skotlando. En Londono mi dufoje ĉeestis la semajnajn kunvenojn de la Londona Esperanto-Klubo, en Brita Muzeo min fascinis manuskriptoj de famuloj. Poste mi intervjuis S-ron V.C. Carter, kiu estas Ĉefa Konservada Funkciulo, Departemento de Manuskriptoj en Brita Biblioteko. Dum du posttagmezoj mi elserĉis valorajn informojn en la biblioteko de la Brita Esperanto-Asocio.

La dua serio da eventoj, malfavoraj al mia poresperanta laboro, komenciĝis jam en Britujo, kiam la sanstato de mia edzino okulfrape malpliboniĝis. En novembro la kuracisto deklaris, ke la malsano estas nekuracebla. Post kvar monatoj, la 13an de marto, mia edzino mortis. Nelonge poste mi mem estis hospitaligita kaj operaciita, sed mi jam resaniĝis. Tiuj traŭmaj spertoj ŝanĝis provizore mian vivperspektivon kaj la skalon da antaŭrajtoj. Sed, feliĉe, unu afero ne ŝanĝis: nia arkivo povas havi la saman adreson, ĉar ni decidis ne vendi la domon.

Respektplene submetita de

D-ro B.J. Balcar

[Noto de la Prezidanto: Tuj post ni lernis pri la malĝoja kaj tre bedaŭrinda forpaso de la kara edzino de D-ro Balcar, ni skribe esprimis al li niajn kondolencojn elkorajn. Certe ĉiuj membroj de la Ligo inkluzivigas en tiu esprimo al nia fervora kaj amata Arkivisto.]

## JARRAPORTO DE LA USONA EKZAMENA SERVO POR 1978

El la jenaj 24 homoj kiuj ekzameniĝis per la KOMENCGRADA EKZAMENO, ĉiuj sukcesis kaj ricevis atestilojn, 16 kun honoro:

Carol Burfoot (Spokane WA); \*George M. Walter (Towson MD); \*Shirley B. Marner (Baltimore MD); \*Lorna D. Wingate (Baltimore MD); \*Paulo Soares de Sousa (Taunton MA); \*Brian P. Donahur (Taunton MA); Yvette B. Massey (Columbus OH); Sally Hopkins (San Antonio TX); \*Angela Barnett (San Antonio TX); \*Max Brande (torrance CA); \*Edward M. Williamson (San Francisco CA); \*Stanley Drake (Orlando FL); \*Barbara T. Moore (Baltimore MD); \*Toni C. Hiteshow (Baltimore MD); Janice B. Owes (Baltimore MD); Joan Werner Peterke (Baltimore MD); Arthur J. Machado (Taunton MA); \*John B. Massey (Columbus OH); Norma T. Quarles (San Antonio TX); David J. Ronicker (San Antonio TX); \*Berninjo Gareto (Manhattan Beach CA); \*Michael Saunter (San Francisco CA); \*Douglas B. Swett (Belleair Bluffs FL); \*Mark B. Weddell (Indian Rocks Beach FL). \*Kun Honoro

El la jenaj 6 ekzamenitoj, ĉiuj sukcesis, 5 kun honoro, pri la DUAGRADA EKZAMENO:

\*John B. Massey (Columbus OH); \*Ward M. Glannini (Columbus OH); \*Douglas B. Swett (Belleair Bluffs FL); Roland G. Dartau (Columbus OH); \*Christian Lee Littler (Columbus OH); \*Mark B. Weddell (Indian Rocks Beach FL).

Unu ekzamenito sukcesis pri la MEZGRADA EKZAMENO: Carle Brawner (Fullerton CA).

Lastjare estis nur 17 ekzamenitoj; ĉijare, entute 21.

## Enspezoj:

Saldo je 1a julio 1977:	\$6.49
Kotizoj (3 po \$2, 35 po \$3)	\$111.00
<b>Bonhavo</b>	<b>\$117.49</b>

**Elspezoj: Poŝto** \$34.07

**Saldo je 30a junio 1978** \$83.42

Nia nuna manpresisto por la atestiloj estas S-ro William Mets (Santa Barbara CA), kiu laboras senrekompense.

Dorothy Holland, Administrantino  
USONA EKZAMENA SERVO  
(Sub la aŭspicio de ELNA kaj AATE)

## NOVZELANDANOJ KONGRESOS

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio kongresos en januaro 1979, inter la 10a kaj 14a. La Kongreso okazos en Masterton, ĉe la Kolegio de Sankta Mateo. Ĉiuj ELNA-anoj estos bonvenaj. Por informo, skribu al: Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, PO Box 330, Wellington, New Zealand.

## VOLAS KORESPONDI

\*Fino Szilágyi Gitta, 27-jara grefta asistanto. Izsáki u. 5, 6000 Kecskemet, Hungario.

\*Irana fraŭlino 20-jara, studentino en Univ. de Tehrano pri ĉiu temo. Farideh Massoumzadeh, No. 95, Massoumzadeh Alley 15 adly ave., Abusaid, Tehran, Irano.

\*32-jara Jugoslava kamparano volas kor. kun vilaĝanoj Usonaj pri turismo kaj vivo. Brindza Karoly, 24000 Subotica, Teslina 31, Jugoslavio.

\*Orientgermana Esp-isto 31-jara, vol. kor. pri modmuziko, porcelanajoj, per kasedoj, ktp. Hans-Joachim Krieg, Kloster-strasse 11, 49 ZEITZ, GDR.

\*Internacia Fako de Japan Esperanto-Instituto ankoraŭ peras korespondantojn el Japanio. Skribu preslitere aĝon, sekson, profesion, hobio(j)n kaj adreson, se eble kun foto. JEI, Waseda-machi 12-3, Shinjuku-ku, Tokyo 162, Japanio.

## RAPORTO PRI LA ELNA KORESPONDA KURSO [EKK] por 1978

Dum ses jaroj (1972-1978) Denis LeCam estris la JEN-Internacian Korespondan Kurson (IKK) al kiu aliĝis 53 studentoj, el kiuj kvin finstudis kaj ricevis atestilojn. Oni uzis la lernolibron *Privilegia Vojo* kaj kondukis la tutan kurson Esperante. Estis entute ok instruantoj: Phil Chenoweth, Denis LeCam, Hugo Ramirez, Roan O. Stone, Earl Bills, Jonathan Cole, Conrad Fisher, Dorothy Holland.

Pro la ekŝigo de S-ro LeCam, ekde januaro 1978 ELNA prenis sur sin la taskon reorganizi la IKK-on. Prezidanto Harmon elektis novan estron, S-ro Dorothy Holland. La lernolibro nun estas *Junulkurso*, kiu uzas la rektan metodon; pro tio, minimumo de la angla lingvo necesas. Ankaŭ uzataj estas demandaro kaj ekzercaro verkitaj por *Junulkurso*. Jam aliĝis 6 kursanoj, kaj restas kvar instruantoj; Earl Bills, Jonathan Cole, Conrad Fisher, Dorothy Holland.

ELNA prizorgas reklamadon, ricevon de aliĝiloj kaj kotizoj, kaj poŝtadon de la studmaterialo, dum la estrino sendas al ĉiu kursano la demandaron, ekzercaron, kaj nomon kaj adreson de ties instruanto. La kotizon oni disigas jene:

Kosto de studmaterialo†	\$16.70
Pago al la instruanto	\$15.80
Pago al ELNA (poŝto ktp)	!2.00
Pago al la estrino (poŝto ktp)	!5.00
<b>Suma kotizo pagita de la kursano</b>	<b>\$39.50.</b>

† Materialo: *Junulkurso*, Wells Vortaro, 5 prononc-diskoj por *Junulkurso*, *Step by Step*, Butler, Demandaro por *Junulkurso*, Ekzercaro por *Junulkurso*, folioj pri prononco.

Dorothy Holland  
Estrino, EKK

## RAPORTO DE ELNA VOJAĜKOMITATO - 1978

La planoj por 1978 estis unue, klarigi diversajn flugprezojn de hejmurbo al Milwaukee por la ELNA kongreso; due, prezenti diversajn vojaĝajn eblecojn al UK en Varna, Bulgario kune kun postkongresaj ekskursoj al Sovetunio. Tria, prezenti ekskursajn eblecojn al Latin-Amerika Kongreso en Marilia, Brazilo. Kvare, prezenti ekskursajn eblecojn por partopreni en ambaŭ.

Ĉiuj planoj estis prezentitaj en 3-paĝa letero al ĉiuj ELNA-anon je la fino de marto, 1978. La respondo por la karavano al Varna estis la plej bona. Ni havis entute 21 personojn de Usono al Varna, inkl. 13 kiuj partoprenis la postkongresajn ekskursojn al Sovetunio. Almenaŭ du personoj kiuj ne antaŭe intencis iri al Varna faris aranĝon en siaj planoj por partopreni la Sovetunian ekskurson. Proks. 10 pesonoj mendis siajn flugbiletojn al Milwaukee pere de la ELNA vojaĝa komitato.

La estontaj planoj de via komitato plani ELNA karavanon al Francujo en marto aŭ aprilo por partopreni paskan semajnan kurson en la Esperanta Kulturdomo en Gresillon, Francujo. Prezenti flugeblecojn al ELNA kongreso kie ajn ĝi okazos. Prezenti diversajn flugeblecojn al UK en Lucerno, Svislando en 1979 kun postkongresaj ekskursoj interne en Svislando.

Por 1980, prezenti flugeblecojn al ELNA Kongreso kaj ankaŭ al UK en Stokholmo kun postkongresaj ekskursoj al Islando aŭ Gronlando.

La prezentado de multaj vojaĝaj eblecoj povas varbi novajn esperantistojn. Estas praktika ekzemplo de la utileco de Esperanto.

Por pli ol 15 jaroj en la kampo de vojaĝaj aferoj, mi ĵus komencis - kun du aliaj profesiuloj - mian propran vojaĝkompanion en Kentfield, Kalifornio - *Horizons Unlimited Travel of Marin* - (Horizontoj sen limo). Laboras tie ankaŭ alia esperantistino kaj komitatmembro, Lucy Harmon. Mi estas preta servi vin por ĉiuj el viaj vojaĝbezonoj, ne nur esperantistaj. Ni anoncos karavanon al Svislando en oktobro aŭ novembro. Por ke mi pli bone povu servi vin, bonvolu aliĝi al la karavano frue. Tiel mi povos pli bone informi vin.

Janet Brugos Young  
Lucille Harmon

## PERSONAL NOTES

**Dr. Ralph Lewin**, Scripps Institute of Oceanography, La Jolla, lectured on Esperanto before the linguistics department at the University of California-San Diego recently. Among other works, Dr. Lewin is the author of *The Biology of Algae and Other Verses* (1978, The Boxwood Press, 183 Ocean View Blvd., Pacific Grove, CA 93950, \$3.95). This work by Dr. Lewin contains a poem in Esperanto.

Foreign guests at Esperanto-speaking affairs this summer included **Doris Worcester** (London); Dr. & Mrs. **Jean Luc Tortel** and daughter, **Claire** - Dr. Tortel is the Esperanto delegate in Berck, France; **Vlasta Obrucova**, Esperanto representative for sports and yoga in Olomouc, Czechoslovakia; **Janet Enghardt**, Sweden; Mrs. G. and Miss A. **Dercks**, The Netherlands; and **Reuben Alberg**, Israel.

Friends of Nature from 18 countries camped at rural abaliget, Hungary this summer. **Bob Bailey**, San Francisco, the only ELNA member there, met many old and new friends, all resting up for the hectic week of the world Esperanto convention at Varna, Bulgaria.

**Martha Walker** (Napa, CA) was interviewed for the Peking Radio broadcasts at Varna by three members of the Peking Radio staff who had sent a tape of Chinese folklore to Dr. David Jordan's Esperanto classes at San Francisco State University in June.

**Jack and Minerva Massen** and **Janet and Ray Young** were among those who visited the Soviet Union following the convention at Varna with letters of greeting from ELNA President Wm. R. Harmon to local societies.

---

### A UNIVERSAL SUBSCRIPTION SERVICE

#### FOR THE UNIVERSAL LANGUAGE

All Esperanto periodicals can be ordered from a single source.  
Send a stamped, self-addressed envelope to:

R. Kent Jones  
Esperanto Language Service Co.  
452 Aldine, Apt. 501  
Chicago IL 60657

## NEWS BITS

**Railroad Esperantists in Rome** drew 350 conventioners from 18 countries this summer. TV program "Antenna 4" covered the event and "Teleroma 56" carried seven debates on Esperanto. A film presentation on the famous Japanese Tokaido Express and decisions on various multilanguage lexicons and tariff lists received considerable attention.

**Rotary International** drew 39,000 people from 83 countries to Tokyo this year. Esperanto-speaking Rotarians enjoyed special arrangements and provided information about the international language.

The 65th annual convention of **Japanese Esperantists** in Mishima August 26 and 27 had as its honored guest Dr. **Humphrey Tonkin**, President of the Universal Esperanto Association.

**Japan and Finland** are the latest countries to produce histories of their Esperanto movements in their national languages. The United States has yet to find a similar historian.

**Ralph Harry**, Australian Ambassador to the United Nations, is returning to Australia September 1. He has been active within the UN in the advocacy of Esperanto as a solution to language difficulties, was translator of the UN Charter and Human Rights brochures into Esperanto. Olympics athletes were the beneficiaries of phrase books which include the international language Esperanto.

#### AN IMITABLE EXAMPLE

Michael Jones, of the Esperanto group ELA in Fort Worth, TX, has set an excellent example of initiative in introducing the international language Esperanto into other organizations.

Michael is a member of the local chess club, and through an advertisement in the local newspaper invites those interested in chess to write for further information. In his replies to those seeking information, Michael adds the following: "It will come as no surprise to you that a definite but unstated requirement of the above-mentioned chess clubs is a knowledge of the English language. Although the clubs make no effort to bridge the language barrier, you yourself might not want to limit all your future chess activity to those who speak English. Chess, after all, is a game played all over the world. For that reason, I am enclosing for you some information about ESPERANTO, the international language..."

It is precisely this kind of initiative that gave rise to a resolution passed unanimously at the just-concluded Esperanto Congress held by ELNA in Milwaukee, which resolution urges all Esperanto-speakers to take an active part in fostering interest in the international language among members of other organizations to which they belong.

Good work, Michael Jones, and good luck to you!

---

### ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA    BOX 1129, El Cerrito CA 94530

Enclosed is \$ \_\_\_\_\_ for  new membership in ELNA for the year 1978.  
 renewal

NAME \_\_\_\_\_

ADDRESS \_\_\_\_\_

CITY \_\_\_\_\_ STATE \_\_\_\_\_ ZIP \_\_\_\_\_

Name and address of each new member published in ELNA Newsletter and next edition of ELNA-Adresaro unless member indicates otherwise.

Check correct category:  Regular (\$15)  Family (\$22.50)  Youth (18 or under) (\$7.50)  
 Student (full-time, 25 or under) (\$7.50)  Senior (renewal only, 65 or over) (\$7.50)  
 Life (\$300)

DATE OF BIRTH (if applying for Youth, Student or Senior rate) \_\_\_\_\_

#### OPTIONAL INFORMATION

Telephone number: Area code ( \_\_\_\_\_ ) \_\_\_\_\_ OK to publish phone and/or call letters in ELNA-Adresaro?

Radio call letters (if applicable): \_\_\_\_\_  Yes  No

## [BAD] NEWS FROM YOUR BOOK SERVICE

Inflation has finally caught up with us. For many years, your book service has charged only \$1 per order for postage and handling. An analysis of costs during this past fiscal year reveals that only \$529.35 was collected for postage and handling, while postage expense *alone* totalled \$1228.68, and estimated materials costs ran to another \$400. The book service operates on a minimal profit margin on all major learning aids, texts, dictionaries, while receiving much less than the standard book store profit margin on all other books and materials.

What happened to postal rates? Here's a real horror story: The January, 1976 third-class rate for 2 ounces (the average on free materials sent to those asking about Esperanto) was 13 cents. In June 1978, the same envelope had to carry 20 cents, an increase of 53.8%! The fourth class "book rate", one of the lowest available, for a 5-lb. shipment on January 1, 1976 was 57 cents; in June of 1978 it was \$1.20, an increase of 110.5% — and that wasn't the **highest** percentage increase!

The only solution we can find is to adopt the system used by other major book services (including that of UEA) for some years; add 10% to the pre-tax total. It is estimated that this new postage and handling rate will produce within a few hundred dollars of the actual cost of postage and materials. A minimum charge of \$1 will have to be put into effect at the same time.

Accordingly, effective **October 1, 1978**, the postage and handling charge on all book orders will become 10%, minimum \$1. It will still be cheaper to order all of your Esperanto books and materials from ELNA rather than direct from UEA, as UEA requires an extra 5 guilders for a check charge (currently about \$2.35), which ELNA does not require.

Sorry...we held this off as long as possible, but life caught up to us!

## HEROLDO ANONCAS ALTIGON EN ABONO-PREZO

La redakcio de *HEROLDO* lastatempe anoncis jene: "Pro la kreskantaj kostoj administraj, eldonaj kaj afrankaj, ni estas devigataj plialtigi la abonon al *Heroldo* ekde la unua de januaro 1979. La nova abono kostos en Usono \$14.00. Por aerpoŝta ricevado oni almetu \$5.00 jare."

*Heroldo* ankaŭ anoncas, ke astronomia kaj islamologia sciencaj suplementoj estas nun en preparo. La libro de Henryk Sienkiewicz (literatura Nobel-premiito 1905) *Tra Dezerto kaj Praarbo* post grandegaj malfacilaĵoj kaj malfruoj, aperos je la fino de 1978.

## Esperanto League for North America

P.O. Box 1129  
El Cerrito, CA 94530  
Usono/USA



**NEWS - PLEASE EXPEDITE**

## OTHER ORGANIZATIONS

Unitarians interested in affiliation with UUUU (Universalist Unitarians for Universal Understanding) via Esperanto, contact: **Allen Boschen**, 195 Partridge Road, Pittsfield, MA 01201.

Scout Esperanto League - for brochure, send a stamped self-addressed business-size envelope to: **Robert W. Rapp**, Box 727, Mableton, GA 30059. A subscription to the magazine *Skolta Mondo* is \$3 yearly.

Esperantist Radio Amateurs are listed among UEA delegates in the *Jarlibro* (Yearbook) with their call signs. **B. J. Chambers** of Hawaii has daily contact by radio with Esperanto-speaking radio amateurs in the United States, Mexico and Japan. For information about "ham" activities contact: **Edward Lindberg**, W2CIL, 113 Maple Drive, Bowmansville, NY 14026.

## RECEPTION FOR UEA DELEGATES AT MILWAUKEE

UEA delegates were honored and thanked for their many services to Esperanto in their communities by William Harmon, acting as Chief Delegate for U.S., at the ELNA Convention in Milwaukee this July.

With over 3,200 delegates in some 55 countries, the UEA network efficiently provides many services to UEA members. These cover a wide range of activity from helping find a suitable hotel to locating a lost friend or acquiring a rare cactus. The delegates of UEA represent a myriad of human interests whether it be Scouting, Red Cross, chess or amateur ornithology...in short, almost anything.


During the reception an exchange of ideas among the UEA delegates brought forth the firm decision to list U.S. delegates by States instead of alphabetically by cities as at present.

In order that the UEA *Jarlibro* (Yearbook) be of maximum service to Esperanto-speakers, fluent Esperantists are encouraged to serve as Delegates. Complete information will be furnished on request by new Chief Delegate Bonnie Helmuth, 765 Agate St. Apt. 3, San Diego, CA 92109, or from the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito, CA 94530.

## AL VI DE MI COMING ON CASSETTES

Alberta Casey, Esperantist songbird of San Diego-La Jolla, CA, announced recently that the success of her record *Al Vi de Mi*, which has sold widely throughout the world, has led her to reproduce the record in a cassette version.

More details will be announced at a later date.



**Address Correction Requested  
Return Postage Guaranteed**